

La GAJ postulas:

- * La konsideron de niaj bezonoj en la politiko, ĉar temas pri nia estonteco.
- * La protekton de niaj viv-bazoj (grundo, akvo, aero) pere de
 - eliro el la energi-ekonomio, kiu detruas la tertrezorojn, kaj el la atom-teknologio !
 - stimulado kaj uzado de medi-akordaj trafiksystemoj.
 - uzado de alternativaj konceptoj en la ekonomio de uzitaj materialoj (antaŭe nomata rubaĵo).
- * Multaflankan kaj malfermitan lernejan sistemon, kiu subtenas la memdestinon kaj mem-respondecon, kaj realigas toleremon, demokration kaj fantasion !
- * Egalrajtecon inter geviroj kaj inter geknaboj !
- * Pageblan loĝ-spacon !
- * Kunvivon de diversaj kulturoj !
- * Vian iniciativon !

La GAJ faras:

- * Surlokajn kaj land-vastajn projektojn.
- * Laborkomunumojn kaj agadojn.
- * Klerigon kaj publik-rilatan laboron.
- * Kongresojn kaj seminariojn.
- * Politikon por gejunuloj kaj gardon de iliaj interesojn ene de la Verda Partio.
- * Festojn.

La GAJ prezentas:

- * Por Vi la kunlaboron en surloka grupo.
- * Por Vi la membrecon kaj ĵurnalon.

La adreso de GAJ (Landesverband Baden-Württemberg)

Grün-Alternative Jugend *Abelsk. 1*

D-71634 Ludwigsburg

(telefono en la FRG: 07141/ 92 24 26 (lunde je 17a - 20a horo))

Sekretario de Asocio de Verdulaj Esperantistoj (AVE)

Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen (FRG)



AVENO

8

bulteno de la
Asocio de Verduloj Esperantistaj

Septembro 1993

Karaj AVEanoj,

Laŭ la lasta resendita letero ni estas 23 geaktivuloj. Multaj sendis materialon de sia propra laboro - do, preskaŭ ĉiu de ni aktivas speciale. Revenis ĉirkaŭ 15 leteroj kiuj ne atingis la adresaton. Do, restas ĉirkaŭ 80 kiuj ankoraŭ ne reagis. Mi esperas, ke kelkaj legis en la lasta VERDIRE la artikolojn pri AVE kaj eble reagos.

Multaj jesis la **demandon pri interŝanĝo de adresoj** - mi almetas la koncernan adresliston sur aparta paĝo.

Korektenda en AVENO7:

p. 2: kompreneble devas esti kW·h, aŭ kWh (dankon Silvain).

En **Viaj leteroj** estis - inter aliaj - alparolitaj tiuj problemoj:

P. Touron (Francio): (pri punkto 4 de la Deklaracio de Paris de Verda Alternativa Ligo, vidu AVENO-n 7) li vidas problemojn el la "Demografia Eksplozo" en la Tria Mondo kaj sekve de tio je la enmigrado (invado) de tiuj homoj rilate al "ruinigo de nia civilizado". Kaj li volas ke "... Tria Mondo aperas nur parenteze aŭ kiel dua punkto .."

Mi provas doni provizoran respondon - Ĉu iu jam ellaboris ĉirilatan (funkciantan) politikon ?

Ĉi tiu estos certe ege grava punkto je la venontaj balotoj - ni eŭropanoj ŝuldas al multaj de tiuj popoloj (koloniigado ktp.), do ni helpu starigi stabilajn sistemojn en tiuj landoj.

Multaj eŭropanoj invadis antaŭ kelkcent jaroj fremdajn kontinentojn pro la samaj kaŭzoj (tro multe da homoj - aŭ or-avidaj ktp.). Nur pere de evoluo eblas helpi al la homoj ke ili ne sentas neceson al troa pliigo kaj (sekve de tio) elmigradon el la hejmlando.

La problemoj de drogoj apartenas plejparte al nia civilizo - nia junularo devas vidi perspektivon por sia vivo.

La senlaboreco estas unu de la kaŭzoj por malsociaj agoj. Ni trovu

vojojn ke pli da homoj povas labori por la socio; ŝanĝo de la kutimaj labor-rilatoj (ekzemple: impostoj ne al la homa laboro, sed al uzado de primara energio kaj tertrezoroj).

La imigrantoj devas trovi spacon en nia (jam nun) mult-kultura socio:

- 1-e kiuj havas (ekz-e francan) civitanekon;
 - 2-e kiuj jam laboris multajn jaron kiel "gast-laboristoj";
 - 3-e la asil-petantoj pro viv-danĝero;
 - 4-e kiuj sentas sin enmigrantoj - necesas po-jara EK-kvoto.
- La krimulojn oni devas trakti laŭ la krimo.

W. Günther (FRG):

Ekzemple en germanio ekzistas du ekologiaj partioj (La Verduloj kaj Ekologia Demokratia Partio). Ekzistas diferencoj inter la ekologiaj partioj de ĉiuj landoj. Mi opinias, ke ni ekologiismaj esperantistoj agu kune kiom eblas kaj akceptu tolereme malgrandajn diferencojn. Se iu sentas limon, li informu la aliajn kaj ni vidu.

La Baloto al la Eŭropa Parlamento

La partioj en Eŭropa Komunumo (EK) nun komencas starigi programojn por la EP-baloto. Jam nun estus necesa eniri en la rondon kiu preparas la por-landan programon. Mia celo estas, ke malgranda teksto pri la uzado de la Internacia Lingvo Esperanto en Europa Politiko estos diskutata en la ĉirilata kunveno.

Mi opinias, ke la AVE-anoj de ĉiuj EK-landoj agu iomete kune en siaj landoj.

Alskribado al respondeculoj

Teksto de ge-AVE-anoj celante al la partioj kaj al la EP-parlamentanoj ankoraŭ mankas. Kelkaj de Vi estas pretaj skribi persone al la eŭropaj parlamentanoj. Ŝajne funkcios pli bone kiam Vi rekte skribas al "Viaj" parlamentanoj. Mi listigas ilin kaj donas la komunan adreson en Bruselo, ĉar mi nur parte konas la personajn adresojn. Sed estus bone, kiam Vi informus nin ĉiujn pri la (ebla) respondo.

Respondoj de EP-anoj:

Ute Haas (AVE,FRG) jam sendis materialon kaj skribis leterojn al du de la virinaj EP-anoj de FRG; **Birgit Cramon-Daiber** kaj **Claudia Roth**:

Claudia Roth

lasis respondi, ke Esperanto en EP ne necesas (laŭ la senco):

- Preskaŭ ĉiuj parlamentanoj parolas alian lingvon kaj la tradukservo estas tre bona. (Pri la kostoj ŝi ne skribis).
- Ĉiu parlamentano rajtas paroli en la lingvo de sia lando (ne regiono). Esperanto en la EP signifus, ke la parlamentanoj malkonfesus sian propran lingvon.

Almenaŭ la lasta frazo estis favora al E-o:

- "... certe ankaŭ Esperanto estas paŝo al pli bona komunikiĝo inter la homoj."

Birgit Cramon-Daiber ne respondis.

Mi skribis leteron kun diversaj argumentoj kaj almetis kopion de VERDIRE. Mi persone donis ĝin al **Claudia**, ŝi vidigis intereson.

Claudia kaj Birgit ankoraŭ ne respondis - mi admonos ilin.

La plej interesa novaĵo rilate al internacia agnosko de Esperanto estas certe tiu de la Internacia PEN-klubo; verŝajne dank' al niaj beletraj aŭtoroj.

Junulara Agado

Eble la gejunuloj havas pli grandan emon (kompare al la plenkreskuloj) transpreni Esperanton kiel interŝanĝlingvo ?

Do, mi demandas la aliajn AVE-anojn, ĉu en Via lando ekzistas verd-politika junulara grupo ?

Kaj ĉu Vi eble povas starigi kontakton al tiu grupo ?

-> Eble pere de ekzemplero de VERDIRE <-

Ekzemple en Baden-Virtemberg (FRG) ekzistas GAJ (Verd-Alternativa Junularo) kaj en Hessen (FRG) ekzistas Grüne Jugend Hessen (Verda Junularo Heslando) - lastatempe ili kunvenis kaj decidis fondi asocion por ĉiuj federaciaj landoj de FRG.